

Seslingva Fakvortaro pri Internacia Poŝt servo

Algimantas Piliponis :

Tarptautine Pasto Tarnypa - Service Postal International - International Postal Service - Internacia Poŝt servo - МЕЖДУНАРОДНАЯ ПОЧТОВАЯ СЛУЖБА Internationaler Postdienst - Vilnius 1996, 352 paĝoj, prezo ne konata

Unuavide : tre solida verko, firma kovrilo, lukse tegita per verda kvazaŭledo, titolita per oraj literoj, senriproĉe presita sur bona papero, firme bindita.

Duavide : verko kiu aparte, preskaŭ sole, celas litovan uzanton: ja la 1305 artikoloj laŭdirde post la litova kapvorto prezentas klarigon, laŭ kiu oni povus kontroli la fidecon de la proponitaj alilingvaj ekvivalentoj; povus - se "oni" komprenus la litovan! Sed tio, kvankam bedaŭrinde, ne koncernos multajn el la nelitovaj legantoj. Ili do vane serĉos iun enkondukon en sia propra lingvo, kiu helpus kompreni la sistemon kaj bazajn principojn de la libro.

Triavide : jen, mi eraris; almenaŭ esperantistoj ĝuas privilegion: trafoli-umante la verkon, tuj antaŭ la esperanta indekso, sur p. 254, ili trovas "Rimarkoj"n, per kiuj ili informiĝas inter alie, ke "la indekso estas ordigita laŭ abocoo vico de unua vorto de la termino". (Dum la kaplinioj de la artikoloj estas evidente ordigitaj laŭ la ĉefaj vortoj. Nepre ja laŭdiras la klara ordigo de la libro kaj facila trovebleco de iuj el la fakvortoj: ne pli ol 6 artikoloj sur unu paĝo, ĉiam en la sama vicordo, ĉefparton kaj indeksojn ligas alfanumeraj referencnumeroj - el la koncerna litero de la Litova alfabeto kaj la kuranta numero de la esprimoj).

Sed francoj, angloj, rusoj kaj germanoj restas "antaŭ la pordo" - "starantaj en pluvo"! Al ili neniu klarigas, ke ili devus "dum la analizo pleje konsideri la franclingvan parton de *Vocabulaire polyglotte du service postal international*, eldonita de Universala Poŝta Unio en Berne 1992 aŭ litovan parton de nia vortaro - kaj ke, cetere, la "oficiala karaktero" de tiu "*Vocabulaire*" delogis la aŭtoron kaj siajn tri (samlingvajn) konsilantojn, transpreni "la diverslingvajn tradukojn, ne korektante la rimarkitajn malĝustajojn"! (Ĉu tio signifas, ke per malfermitaj okuloj ili falis en la kaptilon de "vortarista eraro" - la heredado de eraroj de unu vortaro al alia, sen intera kontrolo per vivantaj "denaskaj" regantoj de la koncerna lingvo?

Cetere, la unupaĝa literaturlisto kun 33 titoloj enhavas nur 2 Esperanto-fontojn. Kial la kompilinto ne konsultis la Telekomunikadan Terminaron (esperanta-angla-germana-rusa) de A. JAUŠKIN (troviĝantan en la fakorgano "Interligilo") aŭ *Fremdsprachige Korrespondenz für Philatelisten* (9-lingva) de Pavel KUCHARSKÝ? Fakaj tekstoj ŝajne tute ne trovis atenton.

Esperanto-komprenantojn ankaŭ atingas la averto, "ke la tradukoj en diversaj lingvoj ne ĉie koincidas kun la baza franclingva termino kaj ĝia klarigo". Evidente do mankas lingve kaj fake kompetentaj reviziantoj por almenaŭ kvar el la listigitaj lingvoj. Por Esperanto kunrespondecas *Draguško S. PETROV (Sofia)*, prezidanto de Internacia Poŝtista kaj Telekomunikista Esperanto-Asocio, redaktoro de "Interligilo".

Certe por la Esperanta parto validas la aserto de la verkinto, ke "tiel ampleksa poŝta terminaro estas prezentata unuafoje" - kaj ĝuste tiuj inter-nacilingvaj solvoj ŝajnas plejofte klaraj, simplaj, facile kompreneblaj, eĉ por nefakulo (kiel la recenzanto) - male al la germanaj, kiuj foje sonas pezaj, komplikaj, burokratecaj - supozeble pro ilia longtempa uzo de post la pasinta jarcento. Ekzemple: "*Anfechtung/ Bestreitung der ordnungsgemäßen Durchführung einer Verrichtung*" anstataŭ "Debato pri laŭreguleco de ago" (T1), aŭ "*Bei den Postgiroämtern / Postscheckämtern / Postscheckämtern zahlbar gestellte Papiere*" anstataŭ "Valorpaperoj deponitaj en poŝt-ĉekaj oficejoj" (Ĉ10). Tamen: sub N6 al la Franca "*parti*", la angla "*Gone away; removed*" kaj la germana "*Abgereist*" malegalas Esperanto "Ne enmanigita pro forveturo" (elektita eble pro la trivorta litova esprimo?). La saman kazon ni trovas sub N7, kie la franca "*Décédé*", la angla "*Deceased*" kaj la germana "*Verstorben*" ne koincidas kun la esperanta "Ne liverita pro morto". Por "Periodaj presajoj" (L45) eble sufiĉus "Periodaĵoj"? Jen nur kelkaj, malmultaj, hazarde trovitaj malĝlataĵoj. Kompletan seriozan reviziadon povus fari nur poŝtaj fakuloj, kiuj krom la gvidlibro almenaŭ komprenas la klarigojn.

Mi vane cerbumis, kial francoj, kiuj trovas sian lingvon en la ĉefparto ĉiam kiel unuan tuj post la gvida, nome litova, devas serĉi sian indekson kaj trovi ĝin nur en la plej lasta fino. Prave la kompilantoj "esperas ricevi rimarkojn laŭ specialeca kaj lingva vidpunktoj el diversaj landoj" kaj eĉ aldonas adreson por tiuj rimarkoj. Sed, unue, tiu peto atingos nur tiujn, kiuj komprenas Esperanton, kaj due: ĉu ne estas iom malfrue? Ĉu la eventualaj kritikoj kaj plibonigo-proponoj havos ŝancon, eniri tiel solidan verkon, firme binditan.... (vd. komenco). Restas nur la espero, ke tamen multaj interesitoj pri la evoluo de la faklingvo en Esperanto aĉetos la libron, kiu siaspece estas vere unika kaj valora.

Wera BLANKE